Se en **Futuno**, kie *Tara* haltis en decembro la koralrifoj estas « nekredible sendefektaj » kaj « la marvivo bone fartas » « je tri tagoj de marveturo » de tiu unua polinezia insulo, ĉu en **Tuvatuo**, ĉu en **Kiribatio**, ĉu en **Samoa** « 70% el tio kion ni vidis jam mortis », rakontis **Romain Troublé** la ĝenerala direktoro de la Fondaĵo Tara Ekspedicioj.

« Tiu besto, la koralo, perdis sian etan algon, kiun ĝi enkorpiĝas por vivi, ĝi blankiĝis kiel niaj ostoj ». Li ankaŭ klarigis, precizigante ke tiu fenomeno okazas ĉirkaŭ 31 gradoj, kaj se la temperaturo ne malaltiĝos, post tri semajnoj, la besto kiu kutime vigliĝas je noktigo por sin nutri, fine mortos.

Je la komenco de tiuĉi jaro la japana ministrerio pri

medio jam anoncis 70 procentan morton de la plej granda rifo de la lando, tiu de **Sekiseiŝoko** situanta en la subtropika arkipelago **Okinaŭo**.

Tio kio okazis en **Okinaŭo** okazas preskaŭ ĉie, aldonis la maristo kaj fakulo pri molekula biologio. La koraloj gravas por turismo, protektado de la marbordoj, kaj utilas kiel vartejoj por la junaj fiŝoj. Ili okupas 0,2% de la oceana surfaco sed estas la vivejo de preskaŭ la triono de la maraj specioj.

#### Misio en Japanio

Post sia alveno antaŭvidita merkredon en Japanion, en la arkipelago **Ogasauaro**, sude de la ĉefa insulo **Honŝu**, *Tara* faros serion de pedagogiaj kaj amasinformaj ŝiphaltoj de la 18a de Februaro ĝis la 25a de Marto, antaŭ tri semajnoj de scienca misio en Japanio.

Tiu ekspedicio estas la dek unua de la goeleta kiu jam trairis Arkton por esplori la bankizon, marveturis sur ĉiuj maroj de la mondo por malkovri la planktonon kaj trakuris Mediteraneon por taksi la konsekvencojn de la poluado per plastajoj.

*Traduko de artikolo de la gazeto « Le Télégramme » de februaro 2017*

« Vekiĝu » : la klubo de Hennebont

## El niaj kluboj

### La koko besto de la jaro !

La jaro de la koko komenciĝas en Ĉinio kiu festas sian novan jaron la 28an de januaro.  
Fokuso al la reganta mastro de la kokejoj.

#### Denta kresto

La kresto estas kovrita per senpluma malglata haŭto.  
La koko havas muskolojn por restarigi ĝin.

#### Pendantaj karunkloj


La karunkloj kiuj pendas sub la beko estas ruĝaj kaj pli grandaj ol tiuj de la kokino.

#### Majesta vosto

Ĝiaj grandaj kurbaj plumoj estas falĉiletformaj. Pro ilia formo oni nomas ilin falĉiletojn en la franca.

#### Pinta beko

Ĝia beko estas el malmolega korno, ĝi daŭre kreskas kaj eluziĝas.  
La koko uzas ĝin por pikbeki sian nutraĵon kaj por glatigi siajn plumojn.



#### Lanugo sub la plumoj

Tiuj beletaj koloraj plumoj ŝirmas la kokon de la pluvo.  
Sub tiuj ĉi, lanugplumoj fiksas aertavolon, por konservi la varmecon de la korpo.

#### Skvamaj kruroj

La haŭto de la kruroj estas kovrita per skvamoj, pro tio ke la praŭloj de birdoj estis dinosaŭroj !

#### Batalergoto

Tiu ungego respondas al la kvina fingro kaj ne tuŝas la grundon. Ĉiu kruro sin apogas sur kvar fingroj : tri antaŭen kaj unu malantaŭen.

*Je ĉiu jaro respondas besto.  
La ĉina horoskopo estas ilustrata de 12 bestoj kaj renoviĝas ĉiun 12an jaron. Tiel sinsekvas la jaroj de la rato, de la bovo, de la tigro, de la kuniklo, de la drako, de la serpento, de la ĉevalo, de la kaprino, de la simio, de la koko, de la hundo kaj de la porko.*

#### Etetaj flugiloj

Malgraŭ siaj etaj flugiloj kaj sia peza korpo, la koko kapablas traflugi mallongajn distancojn por transiri obstaklojn.

« Vekiĝu » : la klubo de Hennebont

## Rakonto

### Kial ni krokodilas ?



Iam antaŭ tre longe, en la templo de Lanleff okazis renkontiĝo, eble de druidoj. Ili grupiĝis nokte, kaŝe, ĉar proksime de tempo al tempo aperadis ĉi tie Lucifero rajdanta sur krokodilo tra rivero Leff. Samtempe en tiu loko troviĝis knabo Jan, kiu dormis tie post longa serĉado de sia kaprino. Li ekaŭdis iujn voĉojn kaj ekvidis personojn vestitajn per verdaj manteloj. Ili parolis fremdan lingvon. Jan komprenis nur vorton " mal ". Tiu vorto lin terurigis. Timigita li tuj fuĝis. Hejme li rakontis pri tio ĉi al sia fratino Gabi, kiu poste informis tutan vilaĝon, kion li vidis kaj aŭdis. La vilaĝanoj terurigis, ĉar ili pensis, ke temas pri ia diablaĵo. Ili ne plu paŝtis kaprinojn apud la templo.

Gabi, ĉarma junulino kapablis malsovaĝigi bestojn, eĉ gufojn. Oni diris, ke ŝi komprenis ilin. Iun matenon la kuraĝa junulino aŭdacis ĉerpi akvon el la fonto apud la templo. La gufo flugis al ŝi kaj faligis pecon da papero kun strangaj literoj:

ĉ, ĝ, ŝ, ĵ.

Tiu skribaĵo ekinteresis ŝin kaj ŝi provis esplori la aferon. Gabi iris al la templo kaj trovis alian spuron de noktaj vizitantoj : kraĵonojn, bukedon de visko. Sekvan matenon kuraĝe ŝi denove iris al la rivero apud la templo. Ĉe rivero sidis viro kun verda stelo sur la blanka ĉemizo.

Li ekridetis kaj diris :

-Mi nomiĝas Ludoviko. Kaj vi, kiu vi estas ? Ĉu feino ?

-Ne gomprenan ket (1)

Gabi nenion komprenis, tamen ekde tiu momento, ŝi revenadis ĉiutage por aŭskulti la viron kaj tre rapide ekparolis lian lingvon Esperanto. Post ia tempo en la rivero Leff aperis denove Lucifero sur krokodilo. Ĉiuj spektantoj fuĝis kaj restis nur Ludoviko. Per granda ŝnuro li tiel forte ligis al monstro la faŭkon, ke la besto faligis Luciferon en akvon. Tra la rivero Lucifero atingis tuj inferon.

Vilaĝanoj ege admiris la kuraĝon de Ludoviko kaj ekkomprenis, ke li povas esti amiko de Gabi kaj de ili. De tiu momento, multaj el ili komencis lerni la facilan lingvon de Ludoviko, afabla kaj klera homo.

Poste Gabi kaj Ludoviko konstruis grandan domon en Pluezeko kaj ili fondis la unuan Esperanto-asocion en Bretonio, kiu post ia tempo komencis aranĝi la mondkonatajn Pluezekajn Renkontiĝojn. Por ne forgesi meritan gufon oni nomis simpatiajn noktajn renkontiĝojn " gufujo ".

Ĉiuj strebas perfektigi la lingvokonon, sed de tempo al tempo krokodilas, ĉar la lucifera krokodilo plu vivas kaj sukcesis liberiĝi de la ŝnuro.

(1).*Mi ne komprenas.*

La grupo de babilantoj de la kurso pri legendoj, kiun gvidis Małgosia Komarnicka.

Pluezekaj Internaciaj Renkontiĝoj, la 20an de aŭgusto 2017.

## Armor Esperanto

### Semajfina studperiodo de Armor-Esperanto

Resukcesis studperiodo en Saint-Brieuc! Suno brilis kaj la partoprenantoj sin amuzis dum semajnfina kurso, **la 14an kaj la 15an de oktobro** ĉe la domo de asocioj. Eble varmeco kuraĝigis homojn por lerni pli ol kutime!

Armor Esperanto bonvenigis 35 partoprenantojn : 12 komenc-antoj -intoj, kun la instruistoj Alain kaj Maryvonne, 8 progresantoj kun Jérôme kaj 11 babilantoj kun Elinjo, el la urbo Vannes.

Ĉiuj ĝuis diversajn ludojn, interesajn gramatikajn ekzercojn kaj novajn ideojn.

Alain kaj Maryvonne ege ĝojis pro dinamika nova grupo.

Progresantoj studis kaj kreis dialogojn, trejniĝis pri aŭda kompreno kaj lernis gramatikaĵojn per versaretoj de ĵus forpasinta Marjorie Boulton.

Dank'al Elinjo, babilantoj partoprenis « vivkadransimuladon » en tendumejo, kie bonodoris kuirpreparado, meditis stranga viro, fuŝis tendon fulmontondro, kie leterportistino kaj eĉ policisto venis...

Multajn situaciojn, ili rolludis.

Entute, ni ĉiuj havis ŝancon babilu kun aliaj samideanoj kaj renkonti novajn amikojn, ekzemple dum tagmeza paŭzo en agrabla ĝardeno.

Sabaton, je la 17a, Jean-Claude prelegis pri Universala Kongreso en Seulo. Per filmeto kaj multaj fotoj, li bonege montris UK-etoson kaj siajn familiajn spertojn en tiu ĉi azia lando.

Kelkaj komencantoj partoprenis por aŭskulti muzikon de nia lingvo. Pere de fotoj, ili ĝojis kompreni partojn de la prezentado.

Sabaton vespere ni bonvenigis muzikgrupon. « La kompanoj » estis gvidita de FaMo, kun Pierre Bouvier kaj Bernard Legeay kiu malkovrigis al ni grandan instrumenton, nomata suzafono. Triope, ili bele prezentis kantojn de Brel tradukitajn en Esperanton. Ni tiam ĉeestis iun agrablan forcejon en la centro de Saint-Brieuc. Kelkaj partoprenintoj jam antaŭmendis KD-on por helpi la eldonadon en 2018, jaro de la 40a datreveno de la Brel forpaso.

Dimanĉe, libroservo proponis diversajn librojn, originalajn kaj tradukitajn, bildstriojn, lernolibrojn. Tio permesis al ĉeestintoj rehejmeniri kun esperantaj paĝoj, legeblaj en la venonta sumoo-legado !

Ni rigardu antaŭen al la venonta studperiodo eble en printempo...

*Sophie kaj Murielle*

Pri la KD « Brel en esperanto » (13 kantoj)

- Armor Esperanto proponos en 2018 tiun Kd-on en sia libroservo.

- Por koni ĉiujn detalojn (kanzonoj, prezoj, sendkostoj, pagmanieroj, ktp.), bonvolu viziti la retejon de la Kio Duoble Unu : [www.doubleun.com](http://www.doubleun.com)



## Sophie kaj Louise

### Saluton al ĉiuj en la Verda Triskelo!



Mi nomiĝas Sophie, de Anglio sed mi lernis Esperanton en Hispanio, kie mi estis instruistino de la angla lingvo. Mi estos volontulo por Armor-Esperanto kun Civita Servo dum la venontaj dek monatoj.

Jam mi estis en Bretonio du semajnoj, kaj vidis kelkajn belajn urbojn de la regiono. Mi antaŭĝojas lerni pli pri la Bretona kulturo

kaj kiel marŝas Esperantujo ĉi tie.

Mi lernis Esperanton por ke mi interkomuniku kun aliaj homoj sen la angla; kiel instruistino de la angla mi pli bone ol denaskaj anglaj parolantoj scias la malfacilecon de la lingvo! Ankaŭ laŭ mi, la angla havas malĝustan potencon super aliaj lingvoj. Finfine lerni novajn lingvojn plaĉas al mi! Jam en unu jaro mi vidis la multajn avantaĝojn de ĉi tiu simpla, egala kaj internacia lingvo.

Mi prizorgos filmfaradon, mi ĝisdatigos vin per filmoj, esperante, ofte pri la novaĵoj de la asocio kaj miaj aliaj spertoj en Bretonio. Mi ankaŭ gvidos klubon de Esperanto ĉe Enssat, uzante mikson de metodoj kaj ludoj por interesi studentojn pri Esperanto kaj ties eblecoj post la lernado de la

lingvo. Miaj celoj estos trapasi la KER C1 examenon, kaj ankaŭ atingi bonan nivelon de la franca lingvo.

Mi esperas ke dum la jaro mi influos multajn junulojn por interesiĝi pri Esperanto kaj ĝia kulturo. Antaŭen!

### DU INFORMETOJ DE JOSETTE :

1-La esperantisto Eduardo Tràpani (el Urugvajo), delonge volontule tradukas “Mozilla”-n esperanten kaj jam plurfoje estis invitita de Mozilla en internacia kunveno de tradukistoj, kiel administranto de la esperanta traduko. Ĉijare, li estis denove invitita, kaj ankaŭ unuafoje dua esperantisto el Pollando, sed tiu ĉi ne povis partopreni.

Jen tio, kion Eduardo retskribis al mi:

“Pasintmonate la neprofitcela organizo Mozilla, inter kies produktoj troveblas Firefox, Thunderbird kaj Focus, kunvenigis siajn volontulajn tradukistojn de la tuta mondo en apartaj regionaj eventoj. Tiuj volontuloj reprezentas pluraj dekoj da lingvoj. La Esperanta teamo ricevis, unuafoje, du invitilojn ĉi jare, sed nur mi povis partopreni en la latinamerika kunveno, kune kun tradukistoj el pluraj indiĝenaj lingvoj.

Mi iris al Paragvajo por kunveno de tradukistoj, kiuj laboras el Meksiko suden de Ameriko kaj mi treege ĝuis la etoson. Estis reprezentitaj oficialaj lingvoj kaj pluraj indiĝenaj lingvoj, inter ili la gvarania, kiu ĵus sukcesis sian duan grandegan tradukon. Oni kunordigis iom la laboron, por ke ni estu pretaj por gravaj aferoj kiuj postulos multe da traduklaboro. Ni ĉiuj estas volontuloj.”

2-Jean-Pierre Ducloyer ĵus estis invitita partopreni filatelan aranĝon, kiu okazos la 14an de januaro 2018 en Rennes. Li prezentos sian ekspozicion pri Esperanto.

### ĜIS REVIDO LOUISETTE !



Kun plezuro ni kuniĝis por honori nian karan amikinin Louise Rigault. Ŝi translokiĝos fine de tiu monato kaj instaligis apud Rennes proksime de sia familio.

Estas Louise, kiu, antaŭ dudek jaroj, dissemis Esperanton en Pluezek.

Ŝi malfermis kurson, kiu, tie, de tiu tempo, pludaŭras.

Ŝi estas diskreta, sed efika esperanto-aktivulo, kaj ĉefe rolis en la starigo de la Pluezekaj Renkontiĝoj.

Ni deziras al vi, Louise, ĉion bonan ene de via familio !

## Rakonto

## Longorela kuniklo

Antaŭ ferioj, ni legis tekston de Jeanne pri kunikloj, en la Verda Triskelo n°41 de oktobro 2016. Tio memorigis al mi fabelon pri kunikloj, kiun mi rakontis al miaj infanetoj.



Antaŭ tridek ses jaroj, mi estis kunikloj-bredisto, kiam mi alvenis en Begard.

Ĉiutage, kiam mi eniris la kuniklejon, mi demandis min : « Kial kunikloj havas grandajn orelojn ? » Mi decidis demandi al instruitaj kaj saĝaj homoj.

Unue, mi renkontis faman zooteknikiston en Rennes-Universitato. Li diris : « Revenu. Mi serĉos en mia biblioteko. » Kelkajn semajnojn poste, li skribis al mi : « Mi multe serĉis, sed nenion trovis kial kunikloj, origine, havas grandajn orelojn. »

Poste, mi demandis al membro de Akademio de bestkuracistoj. Li ne povis respondi.

Mi demandis Papon. Li respondis : « Dio kreis la mondon, laŭ sia bildo. Se kunikloj havas grandajn orelojn, estas Dia volo. »

Mi demandis al tibetan lamaon. Li diris : « Longaj oreloj estas belaj, kiel ĉiu objekto en naturo. Rigardu kaj meditu ! »

Mi finfine renkontis sian ĉefon, amikon de mia joga instruisto. Li alvenis al Francio por prelegi kaj proponi staĝojn. Post manĝo de bongusta kuniklo preparita de mi, ni sidiĝis ĉirkaŭ fajro, trinkante glasojn da rumo. Li diris : « Ĉu vi havas kelkajn demandojn ? »

Mi profitis la okazon : « Ĉu vi scias kial kunikloj havas grandajn orelojn ? ». Li longe cerbumis, kaj

finfine respondis : « Estis ekde longa tempo, tre longa tempo, kiam kokinoj havis dentojn. Tiuepoke, kunikloj havis malgrandajn orelojn, kiel hundoj, katoj, homoj... Iun fojon, Johano-kuniklo eliris el sia tera domo. Estis frue matene. Roso kovris la kamparon. Johano ĝojis : li bone dormis, li kapriolis kaj manĝis kelkajn bonajn herbojn, florojn, burĝonojn. Sur sia vojo, li renkontis sian kapran amikon Zebulon, kiu forte frapis sur sekan arbon per siaj kornoj.

- Bonan tagon, amiko ! Kion vi faras ?

- Mi preparas ligno-provizon, antaŭ vintro. Mi aŭdis televide, ke vintro estos ege malvarma tiun jaron. Mi frapas, ĉar mi volas, ke sekaj branĉoj falu.

- Estas laciganta, vi riskas rompon de viaj kornoj. Ĉu mi povas helpi vin ?

Antaŭ ol Zebulon respondis. Johano saltis antaŭen. Unue, li preskaŭ svenbatiĝis kiam li tuŝis la arbon. Kuraĝe, li klopodis denove. La duan fojon, li saltis, kaj retrovis sin blokitan inter du branĉoj.

- Zebulon, helpu min ! Mi ne plu povas movi !

- Kiel mi povus helpi vin ?

- Tiru por malbloki min

Zebulon prenis la malantaŭan piedon.

- Aj ! aj ! vi plilongigas min !

Zebulon rimarkis la belan blankan voston de la kuniklo. Li tiris.

- Aj ! aj ! se vi rompas mian voston, legu la tekston de Jeanne, ne estos bone ! Mia vosto estas kiel marista kvasto !

Zebulon poste provis tiri antaŭan piedon. Nenio okazis ! Johano kriis, sed ne moviĝis. Zebulon ne plu sciis kiel helpi sian amikon. Finfine, li komencis tiri oreleon. Li tiris, tiris. Subite, Johano ŝprucis kaj falis teren.

- Dankon, mia amiko ! Vi salvigis min !

Johano ne vidis, ke siaj oreloj plilongiĝis, ĉar li estis tro laca. Li foriris por dormi en sian teran domon.

Ekde tiu tago, kunikloj havas grandajn orelojn.

Kredu min, ĉar la sia ĉefo mortis antaŭ kelkaj jaroj, kaj nun mi estas la deponprenanto de tiu rakonto.

*Hubert, Klubo de Guingamp*

## UK en Seŭlo

### KOREIO 2017 Malkovro dank al UNIVERSALA KONGRESO gastigemo de koreaj amikoj.



Tiun jaron okazis la 102a Universala Kongreso en Seulo, la korea ĉefurbo kiu enhavas 25 milionojn da loĝantoj kun ĝiaj ĉirkaŭaj urboj. En Seulo, estas eĉ 16746 loĝantoj po 1 kvadrata kilometro! Se estus tiel ĉe ni, ni estus 115 milionoj da bretonoj en departemento Cotes d'Armor ; Imagu la kaoson ! Daŭre skrapuloj estas ankoraŭ konstruitaj en la ebenaĵo apud Seulo. La koreaj urbegoj funkcias sufiĉe bone dank'al tre efikaj publikaj transportoj. Sed ĉu la estonco de la homaro estos feliĉa en ĉiam pli grandaj urboj ? Mi dubas ! Nia amikino Ana kaj ŝia edzo decidis ke NE kaj iĝis kamparanoj. Ni vizitis ilin post la UK kaj ĝuis malkovri Korean kamparon.

En Koreio, ĉefe, ni spertis varmegan veteron. En Seulo, surstrate, ni multe ŝvitis, sed kelkfoje estis la ĉielo kiu ŝvitegis. Tiam, post unu minuto, vi estas tute malseka ĝis la kalsoneto ...

En Seulo, ekzistas ankoraŭ kelkaj kvartaloj kie oni povas spekti la malnovan korean domostilon. Sed tiuj lokoj estas turismaj kaj multekostaj lokoj. Tamen, tie la domoj belas! Ne estas multe da mebloj en koreaj domoj. Eĉ litoj ne estas multaj kaj oni ofte dormis surplanke en la alternativa lernejo kaj en turisma kvartalo Jeonju.

En Seulo, ni vizitis la nacian muzeon kie oni povis gustumi kiel estis la vivo dum la jaroj 1950 – 1980. Oni povis vidi la unuan aŭtomobilon produktitan en Koreio en 1975 : La Hyundai Pony. 42 jaroj poste, Koreio estas la lando kiu produktas la plej grandan kvanton da automobiloj. Kiel ili sukcesis tion ? Niaj koreaj amikoj diris ke, post la milito, la koreanoj investis en edukado de siaj infanoj. La plej lertaj eniris tre famajn usonajn universitatojn kaj reveninte en Koreion kreis tre efikajn firmaojn.



## UK en Ŝeŭlo (sekvo)

Sed nuntempe, elstara korea preleganto klarigis ke edukada sistemo ne tiom bone funkcias. La studentoj lernas tre bone ... por eniri grandajn firmaojn kie la laboro estas bone pagita kaj ne tro malfacila.

Li klarigis la celojn de la korea edusistemo :

Post la korea milito, edusistemo devis instrui homojn por rekonstrui la landon

Je la 2a industria revolucio, edusistemo devis disvastigi sciojn

Je la 3a informadika revolucio, edusistemo devis instrui homojn kapablajn solvi problemojn.

Kiel inĝeniero, mi estas unu el ili !

Kaj nun, je la cifereca revolucio, edukado devus instrui al studentoj entreprenismon kaj humanismon. Bedaŭrinde tio ne ankoraŭ okazas.

Mi tute konsentas pri la opinioj de sinjoro Sungcho Hong, delonga estro de seula mezlernejo.

Alia tre interesa renkonto okazis kiam 300 esperantistoj partoprenis en oficiala pontkunveno por la unuiĝo de Koreio en la korea parlamento. Tiu sukcesplena evento estis farita kaj estrita de sinjoro So Gilsu . Dank al ĝi, la esperantistoj estis bone agnoskitaj de la koreaj masmedioj. Mi vere admiras la valoran laboron kiun niaj koreaj samideanoj faris. Sed por mi, la pinta momento okazis en la buso por atingi la parlamenton. Tute hazarde,

mia najbarino estis sinjorino SUNJO (Hujimoto Hideko). Ni interparolis perfekte dum pli ol du horoj dank'al esperanto. Tio definitive pruvis al mi ke Esperanto funkcias mire eĉ kun azianoj. Sunjo tre bone parolas esperanton. Ŝi lernis ĝin antaŭ 5 jaroj kiam ŝi konsciis ke ŝia vivo ne daŭros eterne. Ŝi klarigis al mi ke okcidentaj kaj japanaj kulturoj tute malsimilas : La vivo por ili tute ne estas simetria. Eĉ beleco por ŝi necesas pli da diverseco ol por ni en okcidento. Feliĉe, ŝi diris al mi ke Esperantujo alportas al ŝi fidon en bonkoraj alikulturanoj. Per tiu esperantista fideco, ŝi povas kaj ŝatas paroli kun ni pri profundaj sentoj de sia kulturo. Dankon al sinjoro Zamenhof pro tiu bela lingvilo !

Venontan fojon, mi parolos al vi pri Norda Koreio laŭ esperantista vidpunkto ĉar reunuiĝo de Koreio estas la plej grava politika temo por niaj koreaj amikoj ...

*Jean-Claude & Hélène Dubois - Lannion*



## Agado de niaj klubanoj

### Ateliers des Terriens Malins, diffusion de l'Esperanto, etc !

Des projets croisés très ambitieux démarrent petit à petit depuis le pays d'Auray, avec pour objectif d'aider les enfants (et les adultes) à joyeusement dépasser les crises environnementales et sociétales à venir.

Un des objectifs est donc naturellement : la diffusion massive de l'Esperanto !

#### Petit historique du démarrage :

- Pour notre changement de vie, lors d'un tour de France "sans argent et sans pétrole", nous (Izabel et Damien) découvrons par hasard l'Esperanto grâce à Maja lors d'un stage ... d'apiculture en WWOOFING !! cf VT précédent ...

- Une fois installés près d'Auray, nous débarquons, débutants, aux rencontres de Pluezek de 2016. Avec un très grand soutien de Manjo, nous créons l'association "Esperanto Pluvigner et alentours" et une dizaine de bretons démarrent (et terminent presque) la traduction du livre "Terriens malins, missions spéciales pour écoaventuriers" de Delphine Grinberg. Avec gourmandise et impertinence, ce livre précurseur aide les enfants à réenchanter l'avenir de la planète.

- Aux dernières rencontres de Pluezek, nous animons des Ateliers des Terriens Malins (dont vous pouvez voir l'annonce dans l'encart), et animons aussi, pour la première fois, une conférence sur l'ensemble des projets.

#### Quels projets donc ??

Le projet Eco-pédagogique des **Ateliers des Terriens Malins** a pour objectif de :

- Faire vivre aux enfants et adultes des ateliers de découverte sur tous les thèmes : eau, transport, fêtes, communication ... et de formats adaptés à divers cadres : animation de 2min en stand passant, ateliers de 1h pour des projets d'école ...

- Mutualiser des idées d'ateliers sur internet et permettre de trouver efficacement l'atelier recherché : recherche multicritère, formule de 10 ateliers ...

- Donner des idées d'essaimage efficace des ateliers ("jardins", mini-livrets ...)

Le projet de paix internationale **des Amis Terriens** a pour objectif de :

- Permettre à chacun d'affirmer "Si je ne connais pas quelqu'un je ne suis pas son ennemi." en envoyant éventuellement une photo où il est avec quelque chose qu'il aime, un message d'une phrase etc

- Montrer par une grande image constituée de toutes les photos individuelles que nous sommes de très nombreux pacifistes

- Proposer des vignettes individuelles "message + photo" qui servent de support à des ateliers et/ou une correspondance

Le projet E°-pédagogique **Faisons communiquer les Terriens** a pour objectif de :

- Proposer par internet la construction clé en main d'un atelier de découverte de l'Esperanto en proposant des outils pour les 6 étapes proposées : motivation, apprentissage des bases, entraînement, autonomie, correspondance, diffusion

- Permettre à un débutant en Esperanto d'animer un atelier complet d'Esperanto (menant jusqu'à l'autonomie et la diffusion)

Ces projets s'alimentent les uns les autres : les Ateliers des Terriens Malins, portant sur l'écologie et la citoyenneté, permettent de rentrer facilement dans les écoles même en temps scolaire, le projet des Amis Terriens met en relation (directe ou indirecte) les enfants des écoles, et le projet "Faisons communiquer les Terriens" permet à des esperantistes même débutants de faire découvrir l'Esperanto dans ces cadres.

Vous en saurez plus au prochain numéro !

Si vous êtes trop curieux ou motivés pour participer (même simplement en traduisant), n'hésitez pas à nous contacter à izabel[[c](mailto:izabel@riseup.net)]riseup.net ou au 06 27 03 09 10.

## Agado de niaj klubanoj (sekvo)

### Ateliers proposés aux dernières rencontres de Pluezek :

#### Specialaj Misioj por Lertaj Teranoj :

Ĉiutage, infanoj kaj granduloj povos ĝoje malkovri malsamajn kielojn prizorgi la teron, la homaron kaj si-mem. Sen forgesi inventi eksterordinarajn festojn kaj donacojn !

Vi malkovros kaj faros per vi-mem, kune aŭ sola kiel vi preferas. Vi povos elekti laŭmezure la aktivaĵojn kiujn vi volos fari. Certe, respektu la defenditajn valorojn, ili neniam bezonas specifan aĉetitajn materialon kaj vi povos facile denove realigi ilin hejme.

### Ekzemploj de specialaj misioj



- Akvo : Protektu la trezoron de 1000 akvogutoj ! Malkovru kiel uzi pluvakvon : filtru, miksu argilon, fabriku vian cindrolesivon ...

- Revoj kaj donacoj sen "havi" : Realigu kaj helpu realigi revojn sen mono kaj sen fosilia energio ! Ekz : "Kial vi volas havi ĉevalon ?" "Por prizorgi ĝin kaj promeni !" "Ĉu vi vere necesas "havi" ĝin ?" "Ne."

- Transporto : Elturniĝu sen petrolo - magia miksaĵo ! Uzu vian biciklon, beligu ĝin per naboĉapo, floroj, helico ...

- Donacoj, festoj, ludoj : Fabriku per nek gluo nek glubendo ! Origamio, donacopako per ŝtofo (Furoshiki), kunaĵo per "enmeti" ...

- Komunikado : Havu aŭ helpu infanojn havi geamikojn ĉie en la mondo per la bazoj de Esperanto !

- Forĵetaĵo : Mortigu vian gluteman rubujon ! Tiu estas ĝenerala speciala misio ...



## Specialaj misioj por Lertaj Teranoj



Malkovru **KIU** kaŝiĝas  
en via telero !



Kuiro per Suno ?



Eltorniĝu sen petrolo - magia miksaĵo



Protektu la trezoron  
de 1000 akvogutoj

Amuzaj donacoj !



kaj multaj aliaj surprizoj...

## Farendaĵoj notindaj en via kalendaro 2017-2018

### Turneo de Nijole el Litovio de la 3-a ĝis la 24-a de aprilo



### Bonvenon en la kulturdomo Kastelo Gresillon

### venu por AUTUNE 2017 De la 27a de oktobro ĝis la 4a de novembro KIO OKAZOS EN 2018

#### Printempas

**20a – 28a de aprilo**

preparado al KER-ekzamenoj, ekzamenoj

#### Someraj Semajnoj :

**9a – 16a de julio** 4-a [Interŝanĝoj](#) de scioj kaj faroj kaj Esperanto-kurso (provizore)

**9a – 27a de julio** Maratona Esperanto-kurso dum 17 tagoj (provizore)

**21a – 27a de julio** [IEK'18](#) de [OSIEK](#)

### 16-a NovJara Renkontiĝo

27-a de decembro ĝis la 3-a de januaro  
en Saarbrücken Germanio

### Junulara Esperanto Semajno

26-a de decembro ĝis la 2-a de januaro  
En Szczecin Pollando

### La 103-a Universala Kongreso de Esperanto



**28a de julio – 4a de aŭgusto  
Lisbono**

Por kompleta E-ista kalendaro  
vizitu la retpaĝon

<http://www.eventoj.hu/2014.htm>